



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 23 – 26 novembro

# Migranta Hirundo

24-a de novembro 2023, numero 4

Redaktas Dmitrij Ševĉenko kaj Anna Striganova



## Eldonejoj kaj libroj dum la 4-a VK

Sen aldona patoso eblas diri, ke la libroproduktado estas unu el la plej gravaj kolon(eg)oj de la Esperantaj movado kaj kulturo. Dum la 4-a Virtuala Kongreso la aŭtoroj kaj eldonejoj prezentas la librojn.

### 108-a UK: Libroj de la jaro

Peter Baláž

Jen la jam tradicia renkontiĝo, dum kiu eldonistoj prezentos al vi novajn eldonaĵojn! Ne timu, ne temos pri enuiga listo de titoloj, sed oni prezentos la verkojn en plej diversaj kaj amuzaj manieroj, ĉu deklamado, ĉu intervjuo kun la verkinto... Venu, sekvu bone, notu la plej interesajn titolojn kaj tuj poste vizitu la libroservon, kie vi povos foliumi kaj... eĉ aĉeti la prezentitajn verkojn.



La libroservo de la UK en Lisbono



La libroservo de la UK en Seulo

Sabato la 25-a de novembro 2023, 01:00 UTC

### Furoraĵoj de la kongresa libroservo en Torino:

Ekz.	Titolo	Prezo (€)
86	<i>Poŝamiko</i> (B. Allée & K. Kováts)	4,60
73	<i>IKU-libro 2023</i> (Red. A. Striganova, D. Ševĉenko, A. Wandel)	18,35
20	<i>Detala gramatiko de Esperanto</i> (B. Wennergren)	13,75
20	<i>Pri la eta talpo, kiu volis scii kiu faris tion sur lian kapon</i> (W. Holzwarth / W. Erlbruch)	12,65
15	<i>Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj</i> (A. Madella)	22,00
15	<i>La okulvitroj de Lidia</i> (A. Arana)	19,25
14	<i>Konfuziloj</i> (P. Wierzbowski)	13,20
13	<i>Tamen kantas fido</i> (C. Bicknell)	15,15
13	<i>Esperanta frazeologio kaj proverbaro plene klarigita</i> (P. Desmet)	14,85

### Eldonejo KAVA-PECH

Petro Chrdle



Post mallonga prezento de miaj propraj verkoj mi fokusiĝos al la novaĵoj de mia eldonejo. Mi ankaŭ informos pri la sorto de la Esperanto-fako de la eldonejo post kiam mi post nelonga tempo ĉesos eldonadi Esperanto-librojn.

Venontaj kunvenoj de KAVA-PECH kadre de la Virtuala Movada Foiro:

Sabato la 25-a de novembro 2023, 09:00 UTC



Sabato la 25-a de novembro 2023, 19:00 UTC

Libroj de la eldonejo en la katalogo de UEA:  
<https://mallonge.net/16m>



Krom tio, ni invitas vin viziti la Aŭtoran duonhoron kun Petro Chrdle:

Petr Chrdle. Permesilo por foto: CC BY-SA 3.0

«Prezento de miaj lastaj du verkoj, pasintjara Ĉinio, Koreio, Japanio, landoj similaj sed diferencaj kaj ĉi-jara Mia vivo kun Esperanto, se restos tempo ankaŭ koncizege Sen laco por paco kaj Honore al Eli Urbanová (la lastan mi nur redaktis kaj kunaŭtoris).»

Sabato la 25-a de novembro 2023, 14:00 UTC


## 108-a UK: Eldonejo Lorenz

Álvaro Motta

Bazaj principoj de la Spiritisma Doktrino.

Sabato la 25-a de novembro 2023, 03:00 UTC

Libroj de la eldonejo en la katalogo de UEA:  
<https://mallonge.net/16l>



## Aŭtora duonhoron de Sten Johansson



Sten Johansson

Prezento de mia lasta romano "La nepo de Marina", kun eblo demandi kaj komenti.

Sabato la 25-a de novembro 2023, 15:00 UTC

La libro en la katalogo de UEA: <https://mallonge.net/16p>

## Libroj de la Jaro: EAB




Tim Owen



Depost la lasta Virtuala Kongreso Esperanto-Asocio de Britio publikigis 13 librojn.

Vi povas respekti la programeron: <https://mallonge.net/16k>

Libroj de la eldonejo en la katalogo de UEA:  
<https://mallonge.net/16o>



## Eldonejo Impeto

Dima Ševčenko, Anna Striganova



La eldonejo Impeto eldonas librojn en Esperanto kaj pri Esperanto ekde la jaro 1992-a. Inter ĝiaj lastaj eldonoj estas i.a. la libroj el la serio "Oriento-Okcidento" de UEA kaj la libroj de Internacia Kongresa Universitato.



Vendrede, la 24-an de novembro, jam okazis unu kunveno kun eldonantoj de Impeto, kadre de la Virtuala Movada Foiro.

Vi estas bonvenaj al la sekvaj renkontiĝoj, kiuj okazas en la formo de la libera prezento kaj diskuto:


*Sabato la 25-a de novembro 2023, 11:00 UTC*  
*Dimanĉo la 26-a de novembro 2023, 11:00 UTC*  
*kaj 18:00 UTC*

Libroj de la eldonejo en la katalogo de UEA:  
<https://mallonge.net/16n>



## Retrokalkulo al la festo de la Esperanto- Muzeo

★ Alessandra Madella



Kiel niaj legantoj bone scias, jam de la komenco de oktobro 2023 la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-Universitato, kiu troviĝas en la samnoma urbo de Shandong-provinco, komencis festi sian dekjarigon per multaj retaj, hibridaj kaj ĉeestaj eventoj, krom per viglaj eldonaj agadoj. Jam ekis la retrokalkulo al la plej grava parto de tiu du-monata celebrado, kiu kulminos la naŭan kaj dekan de decembro. Temas pri dutaga festo



S-ro Semio gvidas gastojn en la Esperanto-Muzeo

en la malnova kampuso de la universitato, kie ankoraŭ troviĝas la muzeo, atendante sian finan translokiĝon al la nun konstruata granda biblioteko en la nova kampuso. La honora gasto estos la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA), Duncan Charters, kiu anoncis kun sia edzino sian preskaŭ certan alvenon.

Detalan artikolon de Alessandra Madella pri la temo kun fotoj legu en la retejo de Ĉina Radio Internacia: <https://mallonge.net/16j>

Filmeto pri la Esperanto-Muzeo de la Zaozhuang-Universitato, Ĉinio, ĉe jutubo:  
<https://www.youtube.com/watch?v=aUcfOWvq6cc>



Oficiala retejo de la Esperanto-Muzeo  
(en Esperanto): <http://e-muzeo.uzz.edu.cn/en/>



## Voĉpotenco de la Esperanto-Fako en Ĉinio

★ Li Bochuan

Post la establo de Esperanto fako en la Zaozhuang Universitato, ne nur esperantistoj okupiĝas pri tio, sed ĝi ankaŭ kaŭzis publikan debaton pri la celo de edukado kaj voĉpotenco en interkultura komunikado en Ĉinio. Tiu ĉi prelego estas pri la lasttempa situacio kaj opinioj pri tio en la ĉina socio.

*Sabato, la 25-a de novembro 2023, 13:00 UTC*







# La plej bona urso el la tuta mondo ĉe VK

★ Anna Striganova


*Legu al viaj infanoj eĉ se ili  
estas jam plenkreskaj!*

(Fernando Maia)

Mi unuafoje trovis libron pri Winnie-la-Pu en libra ŝranko, kiam malantaŭ mia fenestro same kiel hodiaŭ falis malrapida lanuga neĝo, kaj Kristnasko staris ĉe la sojlo, promesinte multajn miraklojn. La libro estis tiel malnova, ke flavaj folioj forfalas el ĝi kune kun multkoloraj bildoj, de kiuj al mi rigardis ludila ursido. Vidante tion, mia patro ridetis varmete, kiel ne ofte li ridetis ĉar li estis serioza plenkreska negocisto, kaj diris ke tio estas lia libro, la plej ŝatata libro de lia infaneco. Li montris al mi mapon de Pu-lando sur la unua paĝo. Mi tuj ekimagis, kiel mia patro voĉlegos ĝin por mi, sed ja li jam estis senespere serioza komercisto, iom tro plenkreska.




Vidinte en la programo de la VK prelegon "Babilu kun Humphrey Tonkin kaj Sara Spanò pri... Winnie-la-Pu" eĉ kun multon promesanta "... en la titolo, mi ekĝojis, aparte mi antaŭĝuis pri parto de Sara ĉar ja mi jam spertis aŭdi, kiel ŝi voĉlegas, mi ŝategas ŝian stilon. Kaj nun, dum la prelego, mi eksciis, ke ankoraŭ ŝi tiel sonorilete, arĝentece kantas! Winnie-la-Pu ĉiam kantas elpensitajn de si mem amuzajn kantetojn, vi ja memoras, ĉu?



Do, li prenis la antaŭajn piedojn de Pu, kaj Kuniklo prenis Kristoforon Robin, kaj ĉiuj ĝemikoj kaj parencoj de Kuniklo prenis Kuniklon, kaj ili ĉiuj tiris kune. Kaj dum longa tempo Pu diris nur "Aĵ!"... Kaj "Ho!"... Kaj jen, subite, li diris "Pop" kvazaŭ korko eblas boteli.

"Ram-tam-tidi-lam-tam. Se mi scias ion ajn pri io ajn, tiu truo signifas Kuniklon".


Dum la prelego mi eksciis kiel Winnie-la-Pu venis en Esperantujon. Eldonejo Dutton ricevis leteron de Ivy Kellerman Reed kun manverkita teksto de la traduko. Kion fari kun ĝi? Humphrey Tonkin rakontis, kiel li (redaktoro de la libro), ne nur redaktis, sed komence tajpis la tekston de la manuskripto kaj poste iomete korektis kaj reskribis la tekston, kiu ŝajnis al li iom ligneca. Kaj jen, la libro aperis. Konsistanta el dek ĉapitroj. Sara voĉlegis la duan, pri domo de Kuniklo, kaj Humphrey la trian – pri ĉasado kaj enigmaj spuroj. Mi eĉ ne imagis, ke Humphrey, kiun mi konis tia serioza, povas tiel amuze legi!



Unu helan vintran tagon, kiam Porketo forbrosadis la neĝon de antaŭ sia domo, li hazarde levis la kapon, kaj jen

Kaj la libro mem, aperinta sur la ekrano, kolorigis la impresojn per belaj klasikaj bildoj.

Sed la plej kortuŝa parto atendis antaŭe. Sur la ekrano aperis Edmund Grimley Evans, tradukisto de la dua libro pri la ursido (mi ne vidis la eldonon mem, sed koloraj bildoj sur la ekrano aspektis tre allogaj!). Edmundo tre ŝatis voĉlegi la unuan libron en Esperanto al sia eta filino, sed kiam ĝi estis plene tralegita kelkfoje, restis nenio krom traduki la duan. Do, li tradukis ne por eldoni, sed por legi al la filineto.



-Saluton, Porketo, li diris. -Mi pensis, ke vi forestas.-  
-Nes, diris Porketo. -Vi forestis, Pu.-

Antaŭ ol voĉlegi sian ĉapitron Edmundo diris timide, ke li perdetis la sperton de voĉlegado, ĉar ja lia filino aĝas nun dek ok (do kiel mia patro iam, ŝi estas jam senespere plenkreska). Kaj li eklegis tiel vigle, kvazaŭ ni spektus profesion bildfilmon, kaj li kantis ankaŭ, ĝuste tiel, kiel necesis, per tre serioza voĉo tiom neseriozajn kantojn (Humphrey bone diris: "Winnie-la-Pu penas konduki kiel plenaĝulo ne komprenante kiel esti plenaĝulo"). Do, Edmundo legis kaj kantis tiel bonege-serioze, kaj en lia ĉapitro falis neĝo, kaj malantaŭ mia fenestro ankaŭ falis neĝo, tute same kiel tiam,





antaŭ multaj aliaj neĝoj, kiam mi unue trovis malnovan Winnie-la-Pu-libron de mia patro.

Kaj kiam denove sur la ekrano aperis Fernando en sia lanuga kaj tiel Winnie-la-Pu-eca pulovero kaj diris tiun frazon, de kiu mi komencis mian rakonton, ke eb-



las legi al infanoj eĉ se ili jam kreskis, mi pensis, eble nun, dum neĝas tiel lanuge, mi telefonu al mia patro. Li jam emeritiĝis kaj ne plu estas tiel senespere serioza negocisto. Kaj eble li trovu tiun libron, kaj eble li voĉlegu. Kaj, kiu scias, eble evidentiĝos ke ankaŭ li kapablas tiel kanti... tiel serioze... tiel ne seriozajn kantetojn.

*“Ram-tam-tidi-lam-tam. Se mi scias ion ajn pri io ajn...”*

Damne, kial mi ploras?

*“Mi estis Stulta kaj Iluziiĝinta (...) kaj mi estas Urso Tute Sen Cerbo.”*

*“Vi estas la Plej Bona Urso en la Tuta Mondo” (...)*

*“Ĉu vere? Ĉiuokaze estas preskaŭ la Lunĉa Horo”*

*Do li hejmeniris ĝin manĝi.*



**Vi povas esti aŭtoro de *Migranta Hirundo* kaj la *Reta Revuo*!**

**Por kontribui, skribu al la redakcio**

**[revuo.esperanto@gmail.com](mailto:revuo.esperanto@gmail.com)**



Alianco 365 estas plano por monata konstanta donacado al UEA. La celo de la plano estas garantii al nia Asocio financon ekvilibron, kontribuante por pozitiva jara rezulto, kio signifas daŭripove ebligi al UEA plenumi sian mision. Laŭ tiu plano donacantoj pretas donaci po 31 EUR monate al la Asocio, kio egalas donaci po nur 1 EUR tage. Alternative donacantoj povas fari unufojan donacon de 365 EUR por la kuranta jaro.

## Kiel donaci?

### Per banko:

UEA-konto en ING Bank,  
Postbus 1800,  
NL-1000 BV Amsterdam  
(IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,  
BIC/SWIFT: INGBNL2A)

**Per Paypal:** vidu detalajn instrukciojn ĉe la Reta Revuo –

[https://revuoesperanto.org/alianco\\_365](https://revuoesperanto.org/alianco_365).

